



Jaro IV ~ Numero 33.^a

Zaragoza, Junio 1934

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS

Administracio kaj Redakelo: Str. RODA, n.º 14-16

LA SIMIA MANO

II

En la heleco de la vintra suno la morgaŭan matenon, dum ĝi lumbanis la matenmangan tablon, li ridis je siaj timoj.

Estis en la ĉambro tiel kutima kaj trankvila aspekto, kiu la lastan nokton tute mankis, ke la malpura mano estis jetata senzorge sur breton, kiel afero pri kies povo ne multe oni kredas.

"Ĉiuj veteranoj estas egalaj supozeble", diris Sino. White. "Kia ideo venis al ni aŭskulti tiajn sensencaĵojn! Kiel diziroj povas esti plenumataj nuntempe? Kaj, se ili estas, kiel ducent funtoj povas kaŭzi al vi malbonon, karulo?"

"Ĉar ili povos fali sur lian kapon de la ĉielo", diris la frivola Herbert.

"Morris diris, ke ĉio okazas tiel nature, ke oni povas atribui ĝin al koincido, se tion oni volas", diris la patro.

"Nu, ne prenu la manon antaŭ, kiam mi revenos", diris Herbert, dum li leviĝis de la tablo. "Mi timas, ke ĝi eble igos vin malsatinda avarulo kaj ni bezonos honti pri vi".

Lia patrino ridis kaj akompaninte lin ĝis la pordo rigardis, kiel li malproksimiĝis laŭ la vojo; poste reveninte ĉe la tablon multe amuziĝis mokaante la edzan kredemon. Tio tamen ne malhelpis, ke ŝi rapidis al la pordo, kiam la leterportisto frapis, nek, ke ŝi aludis la ĉefserĝenton per helkaj espervortoj, kiam trovis, ke la poŝto portis tajloran kalkulon.

"Mi esperas, ke Herbert havos ion pli valoran, ol siajn spritaĵojn, kiam li venos hejmen", ŝi diris sidigante por tagmanĝi.

"Tre eble", diris Sro. White plenigante por si bierglason; "sed malgraŭ ĉio la aĵo moviĝis sur mia mano; tion ĉi mi povas juri".

"Tio ŝajnis al vi", diris la maljuna sinjorino milde.

"Mi asertas, ke ĝi moviĝis", respondis la alia. "Estis neniuj ŝajno en tio; mi ĵus... Kio okazas?"

Lia edzino ne respondis. Ŝi estis observanta la misterajn movojn de viro, kiu sur la vojo rigardis

hezite la domon kaj ŝajnis peni decidigi sin por ĝin eniri.

Pro mensa iderilato al la ducent funtoj ŝi rimarkis, ke la nekonatulo surportis bonajn vestaĵojn kaj novan kaj brilan, tuboforman ĉapelon.

Tri fojojn li haltis antaŭ la kradpordon kaj poste daŭrigis sian iron ne enirante. La kvaran li restis kun mano metita sur ĝin kaj tiam per subita decido li ĝin malfermis rapide kaj antaŭeniris laŭ la vojeto.

Sino. White en ĉi tiu momento malligis la rubandojn de sia antaŭtuko kaj metis rapidege tiun utilan vestaĵon sub sia seĝkuseno.

Ŝi akompanis la nekonatulon, kiu ŝajnis maltrankvila, en la ĉambron. Li rigardis ŝin kaŝeme kaj aŭskultis priokupate, kiam la maljuna sinjorino senkulpigis la ĉambran malordon kaj la jakon de sia edzo, vestaĵo, kiun li uzis kutime nur por la ĝardeno. Ŝi tiam atendis tiel pacience, kiel ŝia sekso permesis, ke li diru sian vizitcelon, sed li restis dum kelka tempo strange silenta.

Oni... petis al mi veni tien ĉi", li diris kaj li kliniĝis por demeti de sia pantalono kotonan floketon. "Mi venas komisiita de Maw and Meggins".

La koro de la maljuna sinjorino eksaltis. "Kio okazis?" ŝi demandis senspire. "Ĉu io okazis al Herbert? Kio ĝi estis? Kio ĝi estis?"

Sia edzo partoprenis. "Kvietiĝu, kvietiĝu!", li rapidis diri. "Sidigu kaj ne eltiru sekvojn. Mi estas certa pri tio, ke vi ne portas malbonajn sciigojn, sinjoro"; kaj li rigardis la alian fikse.

"Mi bedaŭras...", ekdiris la vizitanto.

"Ĉu malbonaĵo trafis lin?", demandis ekscitege la patrino.

La vizitanto kliniĝis jese. "Granda malbonaĵo", li diris kviete, "sed li ne suferas".

"Ho, danko al Dio!", diris la maljuna virino kruante siajn manojn. "Dankon pro tio, Dio! Dankon..."

Sed ŝi subite ekploris, kiam komprenis la teruran signifon de lia aserto kaj vidis la konfirmon je sia suspekto ĉe la mienon de la vizitanto. Ŝi haltiginte sian spiron metis sian tremantan manon sur

tiun de sia edzo, kiu estis pli malrapida por kompreni. Al tio sekvis longa silento.

"Li estis atingata de la maŝino", diris fine la vizitanto per mallaŭta voĉo.

"Atingata de la maŝino", ripetis Sro. White kvaŝaŭ ne tute kompreninte, "jes".

Li restis sidante kaj rigardis distrite al la fenestro premante inter siaj manoj tiun de sia edzino, kiel li kutimis fari, kiam ili estis gefianĉoj antaŭ kvardek jaroj.

"Li estis la nura filo, kiu restis al ni", diris la patro turniĝante ĝentile al la vizitanto. "Ĝi estas ja doloriga".

La alia tuis kaj stariĝinte iris malrapide al la fenestro. "Mia firmo min komisiis por sprimi al vi ĝian sinceran kondolencon pro via grava perdo", li diris ne rigardante ilin. "Mi petas vian komprenon pri tio, ke nur mi estas oficisto obeanta ordonon".

Neniu respondis; la vizaĝo de la maljunulino estis blanka, ŝiaj okuloj senmovaj kaj ŝia spiro neaŭdebla; la edza vizaĝo mienis same, kiel tiu de lia amiko, la ĉefserĝento, dum sia unua batalo.

"Mi bezonas diri, ke Maw and Meggins malakceptas ĉian kulpon", daŭrigis la alia. "Ili neniel sin konsideras kompensdevigataj; tamen pro la valora servado de via filo ili memvole deziras doni al vi monsumon".

Sro. White lasis la manon de sia edzino kaj ekstariĝinte rigardis terurite la vizitanton. Liaj sekaj lipoj elirlasis ĉi tiujn vortojn; "Kiom da ĝi?".

"Ducent funtojn", estis la respondo.

Sen konscio pri krio eligita de sia edzino la maljunulo kun preskaŭ nerimarkebla rideto, etendis antaŭen siajn manojn, kiel blindulo, kaj falis planken svene.

— (Daŭrigota).

El angla lingvo tradukis,

RAMON DE SALAS.

MALNOVAJ PAĜOJ

Pseŭdo-esperantistoj

(el «Esperantisto», n-ro 42, 15^a de junio 1893)

De tempo al tempo ni ricevas de diversaj flankoj leterojn pli-malpli en la maniero de la sekvan-
ta letero de s-ro X., kiu kuŝas nun antaŭ niaj okuloj: "Jam longe mi ne skribis al vi, kaj vi kredeble jam pensas, ke mi, kiu estis iam varma amiko de la lingvo Esperanto, nun jam forgesis pri ĝi. Se vi tiel kredas, vi eraras. Mi ĉiam restos varmega amiko de Esperanto kaj mi neniam ĝin forgesos. Sed kiam mi komencis siatempe labori por Esperanto, mi renkontis tiom da malfacilaĵoj, ke mi vole-ne-vole devis lasi fali la manojn kaj venis al la konvinko, ke nun la mondo ne estas ankoraŭ matura por tia granda ideo. Sed estu tute certa, ke kiam nur la cirkonstancoj sangiĝos kaj la surdeco kaj indiferenteco de la mondo pasos, vi tuj vidos min en la vicoj de la plej energiaj batalantoj. Skribu al mi, kion nia afero faris de la tempo, kiam mi ĉesis esti aktiva esperantisto; kiom da amikoj la afero nun havas? Kiaj novaj verkoj eliris? Se la "Esperantisto" ankoraŭ eliras, sendu al mi ian numeron de ĝi. Entute estus bone, se vi de tempo al tempo sen-

dus al mi ian novaĵon pri Esperanto, por ke mi ne tute forgesu pri ĝi..." k. t. p. k. t. p.

Ne vere, amikoj, kia edifa kaj grandanima maniero de pensado? Kiam dank' al niaj senlacaĵoj, paciencaj kaj malfacilaj laboroj nia ideo fine venkos, kiam ni povos iam deviŝi la ŝviton de niaj fruntoj kaj post, la eternaj ĉagrenoj, malagrablaĵoj kaj mokoĵoj levi la kapon kaj rigardi kun plezuro la fruktojn de nia laborado, tiam sinjoro X. tuj aliĝos al ni kaj post la venko li fariĝos unu el la plej energiaj kunbatalantoj; Dume "la mondo ne estas ankoraŭ matura", kaj tial s-ro X. en tia grado ne povas esti "aktiva esperantisto", ke li ne povas eĉ... por sia propra persono aboni la "Esperantiston", kiu "havas por li ĉiam grandan indon", kaj ŝian aldonitecon al nia afero li esprimas per tio, ke li petas nin, havantajn tro multe da libera tempo, skribadi al li de tempo al tempo letere pri la stato de nia afero!!

Ne, sinjoroj pseŭdo-esperantistoj! Estas vero, ke ĉia nova, utila ideo en la komenco devas tre malfacile batali kaj pli aŭ malpli frue ĝi venkas. Sed kiam dank'al nia konstanteco la mondo fine ĉesos esti surda al niaj vortoj kaj nia afero ĉesos esti "fantazio, pri kiu la bona tono postulas, ke oni ĝin moku ne esploriginte ĝin", kiam Esperanto estos ĉie akceptita kaj sankciita—tiam ni vin ne bezonos, sinjoroj pseŭdo—esperantistoj. Vi faris malgrandan proveton de laborado, kaj, kiam ĝi restis sen deca sukceso, vi tuj ĉesis! Sed se nia laborado apartenus al tiuj dankoportaj aferoj, kiuj estas kronataj de tuja granda sukceso, tiam ni ja facile trovus milionojn da laborantoj kaj tiam ni ja vin ne bezonus! Vi ĉiuj (via nombro estas ja tre granda), kiuj staras nun kaŝite kaj atendas—ne promesu aliĝi al ni, kiam la mondo maturiĝos, ĉar tiam ni jam ne bezonos maturigantojn kaj post la venko ni ne bezonos helpantojn. Se vi amas nian ideon, laboru por ĝi nun, kiam ĝi bezonas laborantojn; batalu por ĝi nun, kiam ĝi postulas ankoraŭ malfacilegan bataladon; staru forte kaj nekaŝite, kiel granito inter ondoj, nun, kiam monaj rimedoj estas por ni eksterordinare gravaj kaj enhavas en si la demandon: "esti aŭ ne esti".

Ĉia nova ideo devis batali longe kaj malfacile, kaj vi, sinjoroj X. kaj similaj, kiuj ĝuas nun la dolĉajn fruktojn de tiuj ideoj, vi eble ne havas eĉ supozeton pri la maldolĉa ŝvito, kun kiu oni siatempe semis tiujn ideojn. Ni, veraj amikoj de lingvo tutmonda, scias tion ĉi tre bone, kaj ni laboras pacience, pacience, kaj nek la tuta terura surdeco, kiun ni renkontas sur ĉiu paŝo, forpelos nin de nia vojo. Armitaj per tiu ĉi fera pacienco kaj per la konscio de la vereco de nia ideo, ni iras antaŭen malgraŭ la malhelpoj, kiuj baras ĉiun nian paŝon, kaj ni ne dubas, ke pli aŭ malpli frue ni venkos. Sed vi, sinjoro X. kaj milionoj da similaj personoj, kiuj preferas atendi, ĝis la ideo nun mokata kaj persekutata fariĝos ideo moda, atendu trankvile, — sed ne nomu vin esperantistoj. Ni batas nun la dikegan muron, kiu staras inter la popoloj; cent batoj restas sen rezultato, sed ni ne perdas la kuraĝon kaj estas kontentaj, kiam la centunua elrompas unu brikon. Enua estas tiu ĉi malrapida laborado, sed ni ĝin ne ĵetos. Kaj kiam la milionoj da internaj fendoj, kaŭzitaj de niaj paciencaj batoj kaj ĝis nun tute kaŝitaj, subite ekefikos,

kiam la murego, subrompita en diversaj lokoj, en unu bela mateno per unu fojo kun grandega bruo subite disfalos, tiam vi, miopuloj, miros, kiel ĝi okazis, kiam ja hierau ankoraŭ 99/100 de la murego staris netuŝite; tiam vi alkuros al ni, grandane helpas al ni triumfi la venkon kaj vi diros: "ni laboris". Sed la historio tiam ne silentos, sed diferencigos inter la laborintoj kaj atendintoj.

L. ZAMENHOF.

Rim de la Red.: Tiun ĉi belan artikolon, kiun la novaj Esperantistoj ne konas, sendube verkis nia kara Majstro en momento de eksploda indignero. De tiam pasis jam 40 jaroj kaj tamen la teksto konservas sian freŝecon kaj bedaŭrindan aktualecon. Ni trovis taŭga la represon de la Majstra artikolo por instigi al varma, fervora laborado por Esperanto. Eble ankoraŭ estas malproksima la tago, kiam la murego de la homara indiferenteco "en unu bela mateno... subite disfalos".

PATRINECO

(El verko LA VIRINO de Severo Catalina)

Ĉu vi memoras eble la jarojn de via infantempo? Ĉu vi memoras tiun trankvilajn horojn kiam kun la animo libera de ĉagrenoj kaj la koro de zorgoj, vi lasis vian kapon ripozi sur talio de virino?

Ĉu vi memoras, kiel multfoje ŝi zorgeme viŝis viajn larmojn kaj milde vin dormigis per la mola eĥo de ama balado?

Ho! jes, vi tion memoras.

Ni, kiuj havas la feliĉon ankoraŭ vidi tiun virinon sur la tero, ni ĉiuhore ŝin alvokas kun amo; ŝia nomo skribita en la koro estas la nomo plej karesa el tiuj, kiujn la vortaro enhavas.

La nura nomo *Patrino* prezentas al ni tiun virinon, en kies brusto ni trinkis la dolĉegan nektaron de la vivo, sur kies talio ni lasis nian kapon ripozi; tiun virinon, kiu nin karesis, kiu premis inter la siaj niajn manojn, kiu kisis nian frunton, kiu viŝis niajn larmojn, kiu lulis nin, fine, en siaj brakoj per la mola eĥo de ama balado.

Milfoje feliĉaj ni, kiuj ankoraŭ povas ŝin rigardadi per la okuloj de la realo.

Vi, kiuj perdis vian patrinon, ankaŭ povas vidi ŝin, se vi havas koron kaj sentemon.

Vi povas ŝin vidi en la ora revo de via feliĉo. Se la nokta astro sendas sur la teron sian palan brilon, imagu ke la pala brilo de la nokta astro estas la trankvila kaj amema rigardo, kiun via patrino sendas al vi el la ĉielo.

Se vi vidas en la lazura regiono blankan nubeton vagantan kvazaŭ malpeza gazo tenata ĉe siaj du finiĝoj de du anĝeloj, ĝi estas la animo de via patrino, kiu vin rigardante, ridetas pro amo, el la ĉielo.

Se dum melankolia vesperiĝo vi sentas en la valo malprecizan eĥon sin perdantan malproksimen, kaj kiu estas nek la birda kanto nek la fonta murmuro, *ekgenuu*; tio estas la flugilbruo de la preĝo, kiun por vi altigas via patrino.

Ĉe kiam la morto ŝin rabis, la patrino neniam ĉesas ekzisti por vi, kiuj havas koron kaj sentemon.

Popoloj, kiuj degradis la virinan indecon; kiuj

ŝin konsideris kvazaŭ preskaŭ malŝatinda estaĵo, venu. La rezono vin alvokas al juĝado.

[La estaĵo kiun vi malestimas donis vivon al viaj herooj kaj al viaj saĝuloj.

Kiam viaj herooj kaj viaj saĝuloj, kiam la Aleksandroj kaj la Homeroj, la Cezaroj kaj la Virgilioj trapasis la hazardplenajn infantempajn tagojn, virino ilin nutris per la suko de sia brusto, virino ilin dormigis per la lulkanto de sia amo. Kiam iliaj lipoj komencis ekparoli sonojn, virino al ili instruis prononci la por vi riverencindajn nomojn kaj ilin konvinkis pri viaj kredoj, kaj al ili diris, ke estas adorinda patrujo, kiun ili gloris poste per la brilo de iliaj konkeroj aŭ per la magia helo de ilia talento.

Prosistemaj mallaŭdantoj de tiu, de vi nomata, malforta sekso, rememoru ke vi havis patrinon aŭ ke vi ankoraŭ ŝin havas.

Tiuj, kiuj absolute neas la virinan virton, rememoru vian patrinon.

Tiuj, kiuj je la nomo kaj je la memoro de via patrino ne sentas la koron bati pro entuziasmo, apartiĝu, malproksimiĝu.

Sed ne iru en la arbarojn, ĉar tie vi povas vidi la panterinon lekantan ĝiajn idojn kaj la leoninon karesantan siajn idetojn, kaj ne decas ke la panterino kaj la leonino de la arbaroj kaj la ŝafino kaj la birdo de la herbejoj lernigu al la homo la neŝanĝeblajn leĝojn de la naturo, al la homo, kiu estas la reĝo de la naturo kaj unua figuro en la granda panoramo de la kreitaĵaro.

Foriru tien, kie la suno ne lumigas, kie vi trovos virgan spacon neniam plenvolvitan de vivanta spirado; ĉar tie, kien alvenas la sunradioj, kie ekzistas organisma kaj sentanta estaĵo, tie majeste regas la ideo de la patrineco.

El hispana tradukis,
A. N. D.

Pamplona.

Hildegundo kaj Rolando

Germana legendo pri la Rejno

Kiu el la nordo suprenveturas la riveregon por viziti la belegan Rejn-valon, tiun salutas unue la aerumitaj altaĵoj de la Sepmontaro kiel grandegaj gardistoj de la riverego sur la dekstra bordo. Ĉi tie de sur la alta roko la kastelo Draehonfols (drakoroko) rigardas malsupren en la valon. Kontraŭe sur la maldekstra Rejnbordo leviĝas la montosupro, kiu iam portis la imponan Roland-kastelon. Inter ambaŭ, meze de la Rejno, estas la insulo Nonnenworth kun la konstruaĵoj de monahinejo.

Pri ĉi tiuj monumentoj el pratempo rakontas unu el la impresaj legendoj. En sia palaco en Ingelheim, imperiestro Karlo la Granda kortegumis kaj ĉasis kun siaj palacanoj dum longedaŭraj ĉasadoj en belega regiono. El ĉiuj liaj kavaliroj lia nevo "Rolando de Angers" estis unu el la plej bravaj. Kien ajn sinjoro Rolando venis, li estis estimata kaj amata, kaj ĉie li estis afable akceptata. Iam li venis ankaŭ en la "drako-kastelon" kaj dum la vespermang'o li rakontis al la gastama kastelestro, kavaliro Heriberto kaj ties ĉarma filineto Hildegundo pri siaj aventuroj kaj militadoj. En altvalora pokalo la fraŭlino prezentis al la kavaliro Rolando bonegan vinon. La kastelestro eĉ, fiera pri tio, ke li povis regali la nevon de la imperies-

tro, pri kies militglozo oni aŭdis en ĉiuj landoj, petis Rolandon pri honoro, ankoraŭ resti ĉe li kiel gasto kelkan tempon. Kaj tiamaniere okazis, ke Rolando, al kiu antaŭe neniam renkontis tiel ĉarma kaj bela junulino, ekflamis pro amo al Hildegundo. Reciproke ankaŭ al Hildegundo la heroo plaĉis, kaj la patro feliĉe donis sian benon al ĉi tiu interligo. Sed meze en la preparojn por la geedziĝo sonis la milita trumpeto de la imperiestro kaj vokis Rolandon en la batalon. Li sekvis la vokon, kiel postulis kavaliraj devo kaj honoro, kaj pezakore adiaŭis Hildegundo, kiu postrigardis lin melankolie. Monatoj kaj jaroj pasis, nur malofte venis sciigoj. Jen en iu malfrua vespero kavaliro frapis sur la kastelpordegon kaj petis pri dumnokta restado. Gastame li estis akceptata, kaj atentege la kastelfraŭlino aŭskultis liajn rakontojn, ĉar ankaŭ li partoprenis la militiron de l' imperiestro Karlo kaj multon li sciis rakonti pri heroajoj de Rolando. "Je mia flanko li batalis kaj falis—Rolando mortis". Aŭdinte tion, Hildegundo eksvenis kun laŭta timkrio.

Malĝojo nun venis en la drakokastelon, malĝojo pro Rolando kaj Hildegundo, kiu malsana batalis kontraŭ la morto. Tamen ŝia juneca forto venkis la gravan malsanon, malrapide ŝi refortiĝis, sed silenta kaj meditema ŝi pasigis siajn tagojn. Fine ŝi malkaŝis al sia patro sian decidon rezigni la mondon kaj ĝiajn ĝojojn. Monaĥejon Nonnenwerth ŝi elektis por pia izoleco. Pezakore kavaliro Heriberto donis la permeson al sia filino. La episkopo, kiu estis parenco de la familio, malplilongigis la provan tempon, kaj baldaŭ Hildegundo ricevis la permeson por monahiniĝi. Post ĉi tiuj okazintaĵoj ree estis pasinta longa tempo, kiam iun tagon kavaliro Rolando kun belbrila sekvantaro suprenrajdis laŭlonge de l' Rejnborde. Al la kastelo drakoroko ili volis iri por edzinigi Hildegundon, la ĉarman fianĉinon. Li ne mortis, sed estis grave vundita, kaj amika mano savis kaj fleĝis lin.—Kia akcepto! Kun teruro Rolando eksciis, ke la amatino prenis la vualon kaj iĝis monahino. Al Nonnenwerth li rapidis; sed Hildegundo ne salutis lin por ne rompi sian solenan promeson. Sed pro granda aflikto ŝia korpo malkreskis. Kaj Rolando konstruis al si kastelon sur la kontraŭflanka roko, kiu laŭ li estis nomata "Rolandeck". Kaj li pasigis siajn tagojn per tio, ke li rigardis malsupren al la monaĥejo, post kies muroj li sciis la amatinon. Jam post du jaroj Hildegundo mortis pro ŝia sopirdoloro. Sed Rolando, nekonsolata pro la perdo, ankoraŭfoje estis tirata el sia melankolio per la voko al la batalo kaj suferis la heroan morton en la batalo de Roscesvalo.

Tradukita, la 18-10-33 de E. S.

SCIIGOJ

En Linares nia samideano Sro. José Garrido paroladas per Radio por propagandi Esperanton, vekante grandan intereson. Li ankaŭ klarigas kursojn ĉe la tieaj skoltroj kaj mezgradaj studentoj. Nian gratulon pro tiu sukceso.

Niaj samideanoj de Logroño estas farantaj la necesajn antaŭlaborojn por fondi tuj en sia urbo

Esperanto-grupon celantan diskonigi la internacian lingvon tie kaj en la regionaj vilaĝoj. Dekomence ili enkalkulos pli, ol tridek anojn. Jen imitinda afero, por kiu ni tutkore deziras plenan sukceson.

LA MALPLENA LITETO

el José Selgás

El ĉielo venis
Al l'infan' l'angeloj,
Kaj kun kis' ili diris mallaŭte:
—Infan', kun ni venu!
L'angelojn ĝi vidis
Apud la liteto,
Kaj la brakojn al ili turnante
Ĝi diris;—Atendu!
Mi kun vi foriros.
Eksvingis l'angeloj
Siajn orajn flugilojn kaj prenis
Kun si l'infaneton.
Ĉe la pala lumo
De l'frua mateno,
Oni vidis la tagon sekvantan
Malplenan liteton.

El la hispana lingvo tradukis,
VICENTE INGLADA.

PENSOJ

Dun episkopo L... estis matenmanĝanta, venis viziti lin abato X; la episkopo invitas lin matenmanĝi; la abato rifuzas; la prelato insistas: "Episkopa Moŝto, diras la abato, mi matenmanĝis du fojojn, kaj aliparte hodiaŭ estas fasto tago".

(Chamfort).

Iu sin turnis al Sokrato kun jena demando: "Ĉu mi devas edziĝi aŭ ne?—Kiel ajn vi faros, respondis li, vi ja pentos".

(Diogeno el Laerto).

Juĝisto diris naive al unu el siaj amikoj: "Ni hodiaŭ matene kondamnis je morto tri homojn, Du el ili meritis ja tion".

(Chamfort)...

Iam Frederiko la Granda diris al sia kuracisto: "Ni parolu malkaŝe, doktoro; kiom da homoj vi mortigis dum via vivo?—Sinjoro, respondis la kuracisto, ĉirkaŭe tricent mil malpli ol via Reĝa Moŝto".

(De Ségur, Memorskriboj).

La fama, franca muzikisto Berlioz kuŝanta sur la morta lito diris al apuda amiko, rezignacie ridetante: "Nu, mia amiko, fine oni ludos nun mian muzikon".

Oni demandis Fontenellon, kiam li estis jam mortanta: "Kiel iradas tio"—"Tio ne iras, sed foriras", respondis li ĝuste kaj sprite.